E-KLUBO de Stanislav Schulhof + AEH Pardubice

La klubanoj en nombro de 6-10 homoj kunvenadas dufoje monate en hejmo de prezidantino de la klubo, Mirka Kosnarová. Prezidanto de AEH estas Petr Angel kaj agado de ambaŭ organizaĵoj estas komuna. Kelkaj anoj partoprenas en aranĝoj de aliaj kluboj. Sukcesa estis renkontiĝo en BUBENÍKOVY SADY kun kultura programo. Tiam Láďa Hakl dum komuna promeno tra urbo interese atentigis pri ŜTONOJ DE MALAPERINTAJ. Li rakontis pri tiuj ŝtonoj en diversaj urboj kaj demandis, kiu kie tiun ŝtonon vidis. M. Kosnarová kunlabore kun Luba Srbová ĉiumonate eldonas INFORMILON kaj 4 foje jare ĝian suplementon ANTAŬEN. La informiloj havas aŭ retan, aŭ paperan formon kaj oni dissendas ilin eĉ eksterlanden.

Informas: Mirka Kosnarová, 16.9.2026